# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 07/04/2022 Kvincentsepdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 753,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **297,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **186,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **165,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **105,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



la esperanta retradio



Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.

LA MIKROBIOMO EN LA BUŜO 2 APRILO 2022

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917

**EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**
**Numero 9 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la kombinita frazo "Ni manĝos frue ĉar ni iros al filmo" ĉu oni opinias ke "ĉar ni iros al filmo" estas ĉeffrazo aŭ ĉu suborda frazo?
Se ĉeffrazo, kia speco de vorto estas "ĉar"? Kaj kio, se ĝi estas suborda frazo?

2). Kia speco de frazo estas "por ke ni povu iri al la filmo" en "Ni manĝos frue por ke ni povu iri al la filmo'?

3). Ĉu povas ekzisti pli da kernvortoj en unu frazparto?

4). Ĉu la radikokombinaĵo "urbdom" estas laŭ aglutina kombinado aŭ ne? Kaj kial?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 577. *Marcel Leereveld.*

## El Brizbano

*Petro Danzer*



# Mia historio Part 9

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



(9) Kiam mi estis kvar- aŭ kvinjara kaj loĝis en tre malgranda vilaĝo Blaricum, mi rajtis sola promeni en la stratoj, ĉar tiutempe oni ne ŝtelis infanojn. La vilaĝeto havis nur seson da butikoj, kaj unu tagon mi promenis al la buĉisto. Mi restis ĉe la kontraŭa flanko de la strato, ĉar de tie mi vidis strangan okazon: sur la piedirparto ekster la buĉobutiko staris tableto kun sur ĝi firme fiksita porko kiu kriegis ĉar la buĉisto estis verŝanta bolantan oleon en la orelon de la porko. La kriado estis terura ĉar la doloro estis terura. Post kelka tempo la porko mortis, aŭ mortigatis, kaj la buĉisto prenis ĝin en la butikon por distranĉi la beston por vendi la partojn, poste. Mi promenis hejmen kaj rakontis la okazaĵon al miaj gepatroj. Ili iris al la buĉisto kaj diris al li ne plu fari tiun tre kruelan malnovan kutimon, ĉar jam dum multaj jaroj ĝi ne plu estis permesita en Nederlando kaj en aliaj eŭropaj landoj. Se li ne ĉesos tiun kruelegon, ni raportos tion al la polico. Sed kiam ni jam loĝis en Aŭstralio, post la milito, mia edzino kaj mi ferie vojaĝis en norda Afriko kaj estis dum la nokto en ŝlosita hotelo kaj mi aŭdis la samajn kriadojn frumatene venantajn el la tute apuda buĉfabriko. Bonŝanĉe la islamanoj ne manĝas porkaĵon.

Kiam mi kiel juna interaĝulo, eble dekdujara, ludis dum la lunĉhoro en la lernejo , la ludo estis la originala piedpilkado. En la nederlandaj lernejoj oni neniam ludis sporton en la lernejprogramo, nur la svedan korpekzercadon. Krome la infanoj normale ne interesiĝis pri la nacia sporto, futbalo, kaj ankaŭ plej multaj plenkreskuloj ne interesiĝis pri la sportoj nek praktikis ilin. Daŭra biciklado ĉirkaŭ la domo kaj la sveda gimnastiko en la lernejoj jam estis sufiĉe da ekzercado.

En tiu tempo malmultaj homoj vizitis fremdajn landojn, pro la altaj kostoj. Kaj neniuj vizitis Britujon, ĉar oni ne povas bicikli sur la maro. Tamen tre multaj nederlandanoj vojaĝis en la mondo per relative malgrandaj ŝipoj, en la dekkvina kaj deksesa kaj deksepa jarcentoj. Tiel ili okupis , "ŝtelis", la multegajn inter si sendependajn kaj kulture tute malsimilajn ŝtatojn kaj unuigis ilin en unu landon. Se ili ne estus farintaj tion, nun ne ekzistus lando Indonezio. Tio estas bedaŭrinda, ĉar malaperas la diversaj kulturoj sub la ĵava hegemonio, inter alie parto de Novgvinejo kun tute malsama kulturo. Pri tiu inkluzivo kulpas Usono kaj Britujo, kontraŭ la konsiloj de la nederlanda registaro. *Marcel Leereveld*

# Al la informo pri John Massam en AE576 mankis foto.



Finfine venis foto per la helpo de *Gerard Massam.* Li sendis alkroĉaĵon, kiun mi povas malfermi en la komputero. Jen la foto de John. Mi deziras al li ke li ĝuos sian 90 aĝan vivan periodon. *Roger springer*

John, mi gratulas vin pro sukcese atingi grandan aĝon kaj deziras al vi longan daŭrigon de tiu stato" *Franciska T.*

[https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html](https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html)

kaj por la historio de la situacio, la aliaj flankoj de la kialoj kaj la nuna situacio.



[https://www.greanvillepost.com/](https://www.greanvillepost.com/) [https://sputniknews.com/](https://sputniknews.com/) indian world news

Usona vs Rusio estas propaganda milito. Ambaŭ flankoj uzas propagandistojn, sed Usono uzas spertajn profesiajn propagandistojn. Konu ambaŭ flankojn antaŭ ol kredi ion ajn *Roger*

Unuiĝintaj NACIOJ (Sputniko) - La rifuzo de Britio okazigi kunvenon de la Sekureca Konsilio de UN petita de Rusio pri akuzoj pri abomenaĵoj en la ukraina urbo Bucha estas senprecedenca en la historio de UN, diris lunde rusa ambasadoro ĉe UN Vassily Nebenzia.

[UK Refusal to Hold UNSC Meeting on Bucha Allegations 'Unprecedented', Russian Envoy Says - Sputnik International, 04.04.2022 (sputniknews.com)]

Pfizer dungis ĉirkaŭ 600 pliajn plentempajn dungitojn por prilabori raportojn pri malfavoraj eventoj dum la tri monatoj post rajtigo de sia vakcino COVID-19, kun planoj dungi 1,800 pli antaŭ junio 2021, malkaŝas lastatempe publikigitaj dokumentoj. [Pfizer Hired 600+ People to Process Vaccine Injury Reports, Documents Reveal • Children's Health Defense (childrenshealthdefense.org)]

*Roger Springer*

"Sen serĉado, la vero tute ne povas esti konata. Ĝi povas esti nek deklarita el katedroj, nek enmetita en artikoloj, nek iel ajn preparita kaj vendita en pakaĵoj pretaj por uzo. Ĉiu homo devas per si mem mueli la veron . Tion li efektive, faru kun ĉia helpo, kiun li povas ricevi , sed ne sen severa propra laboro" — *Johano Ruskin*



# La Radikaj Kaŭzoj de la Milito en Ukrainio

[The Root Causes of the War in Ukraine - Titanic Lifeboat Academy] elfrancigita
https://arretsurinfo.ch/les-causes-profondes-de-la-guerre-en-ukraine/




Povus esti, ekzemple, ke Putin intervenis en Ukrainio ĉar, Okcidento fermis ĉiujn diplomatiajn eblojn (efektivigo de la Minskaj interkonsentoj, nealiĝo de Ukrainio al NATO), tiel li ne havis alian elekton, se li volis malhelpi ke Rusio estu diserigita kaj fariĝu amerika kolonio. Klaku. Rekomendis *Roger Springer*

Legebla en 28 lingvoj sed ne Esperanto

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



1). Iuj lingvistoj diras ke ĝi estas ĉeffrazo kaj aliaj diras ke ĝi estas suborda frazo.
Laŭ la unuaj do "ĉar" estas konjunkcio kaj laŭ la aliaj ĝi estas subjunkcio.
2). Ĝi estas suborda frazo kun prepoziciaĵo kiel rilata prepozicio
(aŭ : "kiel prepozicio de rilata prepozitivo").
3). Jes se ili estas kombinitaj per konjunkcio" "la patro kaj la filo" (NE 'kun la filo').
4). Jes, ĉar la lasta parto estas la ĉefelemento. *Marcel Leereveld*



**3ZZZ** …._La elsendo de la 4a de aprilo 2022 enhavas mallongajn paroladojn de Marcel kaj informojn pri la venonta Universala Kongreso kaj pri sano.

*Franciska Toubale*